# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 3 Marto, 2012



*Kara leganto, denove ni havas plezuron skribi al vi kelkajn vortojn. Hej, ĉu la vorto "skribi" estas arkaika, ĉu oni devas uzi tajpi aŭ e-skribi? Veninte al Usono antaŭ 8 jaroj mi laboris por la tradukista kompanio de t.n. "rusaj judoj" (kiel Zamenhof) kaj mia estrino konfesis, ke ŝi nun ne scipovas skribi kirile, post 14 jara loĝado en latin-aboca lando, kiel Usono. Se iu el vi spertis ion similan, bv skribi al la redakcio.*

*NN – membro de nia E-societo vizitis Iranon dum la tempo de malfacilaj rilatoj inter du ŝtatoj, eĉ nun irananoj rigardos la ĉielon por ekvidi novan senpilotan aer-spionon (vd suban foton). Apuda bildo montras al vi 1500-jaran fajron, travivu nia kara 125-jara lingvo la samon!*

*Inter aliaj temoj de la marta numero estas gravegaj eventoj el E-vivo: E-USA kunveno kaj kongreso de eŭropaj E-istoj en nia irlanda ĝemelurbo Galivo. Kronas ĉi eldonon bela poemo de ĵus forpasinta Eli Urbanova (1922-2012) – renoma E-verklistino, kunfondinto de EVA.*

*Daŭre restu kun ni, kara leganto!* –La Redakcio

## Irano per Okuloj de Usonano



Antaŭ nelonge nia familio havis maloftan eblecon por viziti Iranon. Mia edzino kaj mi prenis nian filon, kiu estas preskaŭ tri-jara, por ekvidi avinon kaj gekuzojn en Tehrano. Dank'al longaj ferioj en la laborejo kaj plilongigita vizo ni pasigis tie sep semajnojn.

Unu el pli fruaj vizititaj lokoj de nia vojaĝo estis ski-ripozejo Dizin, kie oni povas ne nur sportumi, sed ankaŭ ekvidi la plej altan monton de Irano – Damavand'. Apud urbo de Hamedan ni vidis elfosaĵoj de antikva urbo, poste ni boatadis en granda turisma grupo tra la belega subtera kaverna lago. Du-taga ekskurso al la Kaspia maro donis al ni alian ŝancon eksenti belecon de la landa plezurplena geografio.


Reveninte Tehranon ni daŭre estis turisme okupataj. Turo "Milad" estas alta konstruaĵo kun turnanta restoracio kaj kun observejo sur la pinto. Dum la vizito pentristoj estis pretaj fari senpagajn portretojn de vi. Ni vizitis multajn muzeetojn, disiĝintaj tra la urbego kaj, sendube, infanoj amuziĝis en parkoj kaj ludejoj. Inter ili – bestĝardeno, ŝakluda turniro. Ankaŭ suvenirojn ni aĉetis plaĉe. Vizito de la loka, fama E-klubo en Tehrano estis grava evento de nia vizit-listo. Tie ni renkontis multajn malnovajn amikojn, konatiĝis kun novaj gesamideanoj.

En Irano nur kvar religioj estas permesataj, inter ili – zoroastrismo. En la urbo Jazd ni eniris zoroastrisman tombejon kaj eklernis pri la enterigaj kutimoj de tiu antikva religio. Zoroastrisma templo de Fajro en Jazd (vd foton) estas konata pro sia flamo, brulanta dum pli ol 1500 jaroj. Ĉar Jazd estas dezerta urbo, ni estis surprizitaj per prezentaĵoj de la loka akvo-muzeo kaj la glaciejo apud la lokejo Mejbod, kie en antikva tempo oni kuntenas glacion dum la somera tempo, ne havante tiam la modernajn fridujojn.



Ni ne povas mencii ĉion viditan: de potisto, kiu montris al ni sian metion, ĝis kablotramo, permesanta al vi supreniri montaron; kurantaj kameloj, vidataj de vagonaro. Sed la plej bonan tempon ni pasigis en la familia rondo, kolektante rememorojn kaj fotojn por la tuta vivo. –*NN*

## LK de Esperanto-USA




Landa Kongreso de Esperanto-USA okazos 22-25 de Junio, 2012 en Universitato de Teksaso ĉe Dalaso (UTD). Rimarku, ke NASK okazos en la sama loko kaj tuj sekvos la kongreson. Por la dua fojo NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) prezentos mallongan kursaron (25 de junio ĝis 4a de julio). Do, portu viajn ĉapelon, naĝkostumon, kontraŭsunan kremon, kaj eĉ vakerajn botojn! Alvenu la 25an de Junio, kaj foriru la 4an de Julio – jen ok plenŝtopitaj tagoj de lernado kaj amuzo. ☞

Universitato de Teksaso en Dallas (UT-D) estas rapide kreskanta universitato kun multaj novaj konstruaĵoj, meze de la granda urbregiono Dallas/Fort Worth. La NASKanoj loĝos kune en aparta "NASKejo" sur la kvara etaĝo de nova dormejo. Partoprenantoj loĝos en tri-personaj ĉambraroj; ĉiu havos privatan dormoĉambron, sed dividos salonon, necesejon kaj duŝejon. La dormejo estas klimatizita, la klasĉambroj estas en la sama konstruaĵo. En la dormejo estas granda lavejo kun senpagaj lavmaŝinoj kaj sekigiloj. Oni havas senpagan aliron al interreto (sed devas kunporti propran kablon "ethernet"). La manĝejo estas je plaĉa sepminuta paŝado for de la dormejo.

La internacia instruista teamo de Spomenka Štimec (Kroatio), Tim Westover (Usono) kaj Birke Dockhorn (Germanio) provizos tri nivelojn de lernado. Hoss Firooznia estos la help-instruisto kaj gvidos la eksterklasajn programojn. *–Esperanto-USA*

## X-a Kongreso de EEU




Eŭropa E-Unio plezure invitas vin al la 9-a kongreso de EEU kiu okazos en Galivo (Gaillimh/ Galway), Irlando, 16-20-an de Julio 2012. Kongresejo estos hotelo Ardilaun en Galivo, la pitoreska ĉefurbo de la okcidenta parto de Irlando, kun 70,000 enloĝantoj, situanta ĉe Atlantika Marbordo. Kongresoj de EEU okazas ĉiun duan aŭ trian jaron kaj estas bona okazo por Eŭropaj esperantistoj interŝanĝi ideojn por esperanta agado en Eŭropa Unio, nun multe pli grava pro la ĉiam pli granda kvanto da oficialaj lingvoj – nun jam 23 oficialaj kaj 5 "duonoficialaj" lingvoj. Ĉeftemo estos "Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli" kun emfazo pri lernfaciligaj ecoj de Esperanto por lernado de aliaj lingvoj. Tio aparte gravas post la akcepto de la rekomendo ke "endas esplori kiu dua lingvo pli verŝajne kuraĝigas la lernadon de tria kaj aliaj lingvoj" 30-an de marto 2011 fare de la Platformo por Multlingveco de la EU-Komisiono (reprezentante 29 tuteŭropajn organizaĵojn, 28 el ili neesperantistaj). Tiu rekomendo kaj 140-paĝa oficiala raporto sur kiu ĝi baziĝas, povos malfermi gravan pordon al Esperanto, se ni scipovos efike uzi ĝin. Dum la kongreso tial estas antaŭviditaj prelegoj de gravaj lingvaj fakuloj, laborejoj kaj diskutejoj. Kompreneble, kiel ĉiam, atendas vin ankaŭ riĉa kulturprogramo kaj turismaĵoj. Antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj ebligos al vi ekkoni belegan naturon en la regiono kaj kondukos vin al Dublino, Aran insuloj, Conamara/Connemara nacia parko kaj aliaj vidindaĵoj. Venu kaj kontribuu, ĝuu kaj lernu! *–Seán Ó Riain, Prezidanto de EEU*

## La Peza Vino *de Eli Urbanova*

*Ja estis peza vino,*
*Kiun ni trinkis kune*
*Flamruĝa laŭ koloro,*
*Laŭ gust' tre dolĉa, ĉu ne?*
*Ni tostis... Du pokaloj*
*Ektintis pro la ĝojo...*
*Trinkite – ĝis la fundo.*
*Ah, je kioma fojo?*

*Kaj pasas tag 'post tago*
*En vico senvaria*
*Kaj jen anstataŭ sobri*
*Mi estas plu ebria…*
*Ne volas trankviliĝi*
*La pulseganta sango.*
*Mi pezan vinon sentas*
*Ankoraŭ sur la lango…*

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Roberto Stalzer
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

27an de Marto – Anglujaj vizitoj de Bruso Stigers

24an de Aprilo – Centjariĝo de E-Biblio k Tago de kirila skribo (V. Pajuk)

22an de Majo – Gvatemalo per okuloj de Marko Shafroth

29an de Julio – Pikiniko okaze de 100-jariĝo de IL